SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo! Lanti

# Sennaciulo

Sennaciulo septembro – oktobro 2008, n°9 – 10 (1239 – 1240) ISSN 1163.0442, prezo 5€



Sennaciulo estas la oficiala organo de S.A.T.

www.satesperanto.org




**Karaj legantoj**

Antaŭ preskaŭ 6 jaroj la tiama nova P.K. heredis asocion, kiu unuavide aspektis sana. Tamen, la disvolviĝo de la ekzistanta sociala reto jam faris sian detruan laboron en la tuta mondo, ankaŭ jam en SAT. Asocioj, organizoj, strukturoj, ĉiuj diversaj, perdis anojn kaj novaliĝintojn. Ankaŭ nia asocio devis konfronti la batojn kiujn la nova monda ordo atribuis al la mondo.

La tempo de la grandaj protestmanifestacioj jam pasis. Televidaj elsendoj alportis alian novaĵon. Atenco al ĝemelaj turoj en Usono estis preskaŭ dia donaco por prezidento Bush, por ke li povu krei inundon de timo tra la tuta mondo.

Malantaŭ ĉiu angulo troviĝas iu teroristo, iu diktatoro, iu persono kun malĝusta kredo aŭ dio.

Libereco de esprimo eniras alian dimension. Libereco de esprimo iĝas danĝera afero por certaj homoj, kvazaŭ naskiĝis iu nova nazia sistemo.

Gravaj politikistoj kritikis Georges Bush, sed ili transprenas lian manieron timigi la tutan mondon.

Ĉu vere la mondo estas nun pli danĝera ol ĝi estis antaŭ 50 jaroj? Multaj el ni memoras la Suez-krizon, la minacojn dum krizo en Kubo, kaj kiom da aliaj militoj kaj krizaj situacioj. Tamen, neniam oni disvastigis tiom da timo, kiom tion faris Georges Bush. Li estas la plej bona lernanto de la ekonomia modelo kiu estis starigita en la tempo de Reagan - Thatcher. Temas pri sistemo kiu baziĝas je timo kaj disigado de homoj.

Evidente estas ege facile kulpigi prezidentojn kaj ĉefministrojn, sed certe ni ankaŭ devas kulpigi nin mem. Ĉu ni daŭre pensas, analizas la mitojn kaj faktojn disvastigatajn de la televidaj kaj aliaj elsendoj?

Pere de Sennaciulo ni klopodas doni alian informon, pli rekte, el la lando kie okazas faktoj. Pro tio ni serĉas korespondantojn, homojn kiuj regule akceptas skribi pri tio, kio okazas en ilia propra lando. Ne nepre per akra plumo sed per kritika opinio.

Kiam antaŭ kelkaj jaroj mortis nia k-do Ivo Peyraut, SAT eniris metafore dirite, novan eraon. La strukturo de la P.K. ŝanĝiĝis kaj iom post iom aliĝis junaj homoj kun aliaj ideoj, aliaj emocioj, aliaj parolmanieroj. Pli kaj pli, ili aktivas en SAT, kreis eldonkooperativon, kreis alian TTT-paĝaron, farante multe da laboro sen multe da bruo pri tio. Ili vere diligente laboras, kaj helpis al SAT eniri la 21-an jarcenton.

Nova paŝo nun estas, ke nia k-do Kreŝimir Barkovîĉ transdonis sian taskon de ĉefredaktanto al alia persono. Post 4 monatoj li emeritiĝos.

Jes, plej verŝajne estas videble ke via Sennaciulo aspektas malsame. Ĉu pli bela, ĉu pli bona? Jen percepto de individuo. Sed, kiel promesite dum la SAT-kongreso en Kazanlak, nia revuo devas kiel eble plej baldaŭ kontentigi plej multajn el niaj membroj.

Sennaciulo estas la revuo de la membroj de SAT. Vi devas kontribui, helpi la redaktan skipon krei kiel eble plej perfektan kaj interesan revuon.

Ni certe sukcesos !

Sekvanta dosiero kiu aperos en novembra-decembra Sennaciulo pritraktos la temon: ***"Alirebleco al laboro de la personoj en handikapigaj situacioj"***.
Viajn kontribuojn ni atendas antaŭ la 1-a de novembro."

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
**Plenum-Komitato de SAT** :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.

**Redakta Komitato** - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Frederic Scibor, Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Gary Mickle, Viola Murasaki, Cyril Orsingher, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Etel Zavadlav. Ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Jakvo Schram.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/ jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

# NIA DOSIERO: Paco estos ebla nur kiam ĉiuj armiloj estos detruitaj. Ni agu.

## Ni ne plu atendu

## Ne - al armiloj kaj armeoj









***Sen kondiĉo, ni postulu la malarmadon de nia lando.***

Leĝopropono por malarmado sen kondiĉo

Art.1 La fabrikado kaj la eksportado de armiloj estas malpermesitaj sur la vastaĵo de la nacia teritorio. La transito de armiloj estas malpermesita tra la lando.

Art. 2 La uzinoj, la arsenaloj kaj diversaj entreprenoj, kiuj laboras por la armeoj kaj eventuale por la milito estas transformataj por fabriki civilajn produktojn.

Art.3 La lando permesas ĉiujn internaciajn kontrolojn por konstati la aplikon de ĉi tiu leĝo.

Art.4 La lando detruas aŭ progresive transformas la totalon de sia armilaro kaj de sia militmaterialo ; iom post iom likvidas siajn terarmeon, mararmeon, aerarmeon.

Art.5 La registaro havas la respondecon de la apliko de tiu leĝo, ĝi prezentas ĉiun kvaran jaron unu leĝon, kiu indikas, dum tiu periodo, la programojn de malarmado kaj transformado de armilindustrio ĝis la realiĝo de la fiksita celo en la antaŭa artikolo.

Art.6 La registaro entreprenas federi la landojn, kiuj aplikas similan leĝon.

Simila leĝopropono (n-ro 271) estis registrita ĉe la Prezidanteco de la franca Senato la 22-an de aprilo 1993. Tiu leĝopropono estis metita de kvin ge-senatanoj, hodiaŭ kvar ne plu estas senatanoj. En Francio, post pluraj jaroj, kiam leĝopropono metita ĉe la Senato ne estis debatita, necesas denove meti la leĝoproponon. Do, ni skribis la 11-an de julio 2007 al la Senatanino Maryse Bergé-Lavigne, subskribinta la leĝoproponon en 1993, por peti ke ŝi denove metu ĝin ĉe la Senato. Ni ankoraŭ atendas la respondon. Por malarmadi la tasko estas grandega.

Colette Weiss / André Weiss.